

Renkontiĝo en Mont-Soleil kaj Jacques Mühlethaler, 2-a parto

Claude Gacond, 113-a radioprelego, 1965.12.01 & 1965.12.04

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas Svisa Kurtonda Radiostacio. Prelegas Claude Gacond.

En sia libro *La Vojaĝo de l'Espero* Jacques Mühlethaler prezentas sin tiel : « *Mia situacio estas iom aparta. Mia patro, kvankam francigita, ne perdis sian devenan naciecon. Tio valoras por lia tuta idaro. Rezulto : de miaj unuaj tagoj mi estis elstreĉita inter du naciecoj. Mi estas stranga kapitalisto, kiu, malgraŭ sia natura donacemo, neniam rajtus profitigi sennacianon pri sia riĉeco.* »

Kiel multaj du-nacianoj Jacques Mühlethaler estis de sia infaneco turmentata pri la problemoj de la paco. Li sentis sin fremda al la ŝovinismoj, ĉar li estis disŝirita inter du kontraŭaj ŝovinismoj. Dum la milito li servis sian francan patron kun frato, kiu estis mortigita. Nirg-humure li skribas : « *En majo 1940 mia plejaĝa frato mortis sur la honor-kampo, laŭ la formulado, dum mi eltiris min el tie kun honoro, ankaŭ laŭ la formulado. Unu gloro mortis, dum mi mortigis por la gloro.* »

Mortigante malamikajn kapojn li komencis pensi al la rezulto de tiu buĉado. Kaj li komprenis, ke ĝi neniam povos ĉesi, tiom longe kiam la homoj ne ŝanĝos sian pens-manieron. Dum venkanto fieras pri sia venko, venkito ne povas akcepti sian malhonorigon kaj sin pretigas al nova batalo.

Li tiam rigardis al sia dua patrio Svislando kaj decidis forlasi tiun, kiu militas. En Ĝenevo li fondis librovendejon kaj sin ĵetis en la komercajn aferojn por forgesi la militajn travivaĵojn kaj provi riĉiĝi.

Post la dua mondmilito Francio konis aliajn militojn. Alia frato devis servi sian patron en Alĝerio. En marto 1958 li estis mortigita. Du filaj mortoj, jen peza tributo por patra franciĝo.

Tiu dua vundo estas decidiga por nia ekriĉiĝinta komercisto. Senĉese demandoj venas al li: kial milito, kial neniam paco, kien lia vivo? Ĉu riĉiĝo estas vivcelo?

Lia vivo estas malplena. Kiel ĉiuj ceteraj homoj li nur pensas egoisme al si mem. Ĉe la fino de tiu vojo estas malpaco. Li troviĝas en senelirejo.

Tiam li serĉas alian vojon. Li volas dediĉi sian vivon al io pli valora, pli reala, ol al nura propra komforto. Paco sin trudas. Li volas esti obeema al tiu alvoko de la interna voĉo.

Multaj homoj sentis la saman alvokon. Ili aliĝas al porpacaj movadoj aŭ fondas sian propran movadon. Jacques Mühlethaler ne volas tiun solvon. Li nek volas dependi de komitato, nek volas fondi komitaton.

Unu tagon li grupigas sian personaron kaj avertas tiujn funkciulojn pri sia intenco dediĉi la plej grandan parton de sia vivo por la paco. Kun ili li reorganizas sian firmaon. Ĉiu laboranto fariĝas interesata kunlaboranto. Ĉiu ricevas parton de la profito.

Nun li povas pensi al sia nova laboro. Kiel libristo kaj vendisto de porlerneja materialo li ofte renkontis la instruistaron. Li admiras la sindonon de tiuj homoj, ofte malbone pagataj, sed kiuj tamen plenumas sian funkcion kiel mision. Li multe pensis al tiu misio de la lernejo, misio esenca, grandega, preskaŭ senlima kaj belega, kiu subite povas fariĝi monstra, se la lernejo servas ŝovinismon. Li pensas al la naziismo kontraŭjuda, kiu uzis la lernejojn kiel edukejojn al totala militigo. Ĉu en la aliaj landoj la lernejo estas senriproĉa ? Ĉu ĉie ĝi edukas la infanojn al homaranismo, ĉu ne nur al naciismo ?

Progreson alportas la lernejoj. Sed progreso, kiel riĉiĝo, ne estas celo en si mem. La lernejo estas tro ofte nura instrujo. Ĝi devas fariĝi edukejo. Ĝi devas eduki al la arto majstri la progreson, kiun ĝi alportas.

Renkontiĝo en Mont-Soleil kaj Jacques Mühlethaler, 2-a parto

Claude Gacond, 113-a radioprelego, 1965.12.01 & 1965.12.04

Jen komenciĝas la granda aventuro. Jacques Mühlethaler sentas sin devigata anonci tion, kion li malkovris. Li fariĝos la defendanto de la homarana lernejo kontraŭ la lernejo je la servo de la ŝtato.

« La rolo de la lernejo ne nur devas limiĝi al la instruado de lego kaj skribo, li emfazas, kio certe jam akcelas emancipadon, sed ankaŭ instrui la kunvivadon, kio certe jam akcelas veran emancipadon. Estas la lernejo, kiu devas elradikigi el la spirito de la infano iujn el niaj religiaj kaj politikaj antaŭjuĝoj, tiun maltaŭgan naciismon eble ankoraŭ valora hieraŭ, sed detruiga hodiaŭ. La lernejo devas igi la infanon konscia ano de sama kaj sola specio, tiu de la homoj. Tiam, plenkreskuliĝinta, li povos eksolvi hodiaŭ sensolvajn problemojn. Ni devas eduki la infanon, por ke li kapablu venki la vivon profite al la vivo mem. » Jen kion diras tiu stranga librovendisto, kiu forlasas sian firmaon por prediki veron, al kiu ĉiuj ŝajnas kredi.

Vi aŭdis Radio-Svislandon per la voĉo de Claude Gacond, kiu diras al vi :

Ĝis reaŭdo !

-oOo-